

En la PDF-versio povas manki kelkaj partoj de la enhavo.

## Enhavo

<b>1</b>	<b>Bibliografio pri eldonaĵoj en kaj pri Occidental-Interlingue (Ingvar Stenström)</b>	<b>2</b>
<b>1.1</b>	<b>Magazines</b>	<b>2</b>
<b>1.2</b>	<b>Manuales, phonogrammas e dictionarios</b>	<b>4</b>
<b>1.3</b>	<b>Litteratura in e re Occidental-Interlingue</b>	<b>7</b>
<b>2</b>	<b>Interlingvistike interesaj libroj</b>	<b>10</b>
<b>2.2</b>	<b>Libro de Vilmos Benczik</b>	<b>10</b>
<b>2.2</b>	<b>“Relax” – libro de Wim Jansen</b>	<b>10</b>
<b>3</b>	<b>Novaj libroj pri la Eŭropa Lingvo-politiko</b>	<b>11</b>
<b>3.1</b>	<b>Aktoj pri nederlanda simpozio: La lingva estonteco de Eŭropo</b>	<b>11</b>
<b>3.2</b>	<b>Robert Phillipson: English-Only Europe ?</b>	<b>12</b>
<b>3.3</b>	<b>Siegfried Piotrowski/ Helmar Frank: Europas Sprachlosigkeit</b>	<b>13</b>
<b>3.4</b>	<b>Heinrich Kelz: Die sprachliche Zukunft Europas</b>	<b>15</b>
<b>4</b>	<b>Forgesita (?) materialo: Kolokvaj aktoj el Slovakio</b>	<b>16</b>
<b>5</b>	<b>La biblioteko de Fajsi nun sekura</b>	<b>19</b>
<b>6</b>	<b>Interlingvistiko en Italio</b>	<b>20</b>

## **1 Bibliografio pri la eldonaĵoj en kaj pri Occidental-Interlingue**

Kiel konate, en la jaro 1922 *Edgar de Wahl* publikigis la unuan numeron de nova revuo en nova planlingvo. La revuo nomiĝis “Kosmoglott”. El ĝi poste fariĝis “Cosmoglotta”, la ĉefa organo de la adeptoj de Occidental-Interlingue.

Cosmoglotta, kun interrompoj, daŭras aperadi (kp. IpI 28).

En 2002 do pasis 80 jaroj post la lanĉo de la konata planlingvo. Kun malfruo de unu jaro ni publikigas bibliografion de Occidental-Interlingue.

Ni reproduktas ĝin kun afabla permeso de *Ingvar Stenström*, adepto de Interlingua, kiu verkis bonegan studon pri la historio de Interlingue:

Stenström, Ingvar (1997): Occidental-Interlingue. Factos e fato de un lingua international. Varberg: Societate Svedese pro Interlingua. 40 p. ISBN 91-971940-2-6

### **1.1 Magazines**

## **1.2 Manuales, phonogrammas e dictionarios de Occidental-Interlingue**





### **1.3 Litteratura in e re Occidental-Interlingue**









## 2 Interlingvistike interesaj libroj

### 2.1 Libro de Vilmos Benczik

En 2001, ĉe la eldonejo Trezoro, Budapeŝto, aperis 332-paĝa libro de *Vilmos Benczik*:

Nyelv írás, irodalom kommunikációelméleti megközelítésben.

La hungarlingva libro enhavas detalajn resumojn en Esperanto (Lingvo, skribo, literaturo en komunik-teoria aliro, pp. 309-16) kaj en la lingvo angla (Language, Writing, Literature: A Communication Theory Approach, pp. 317-24).

La oka ĉapitro "provas analizi iujn teoriojn kaj prognozojn pri la estonta evoluo de la homa komunikado" - Temas interalie pri (ia) postlitera, parolprefera kaj bildprefera, ikonum-prefera epoko... (do ne pri Esperanto aŭ aliaj planlingvoj).

Sur paĝo 70 oni povas trovi specialajn konsiderojn koncerne la Esperantajn alfabeton, skribosistemon kaj fonemsistemon. (Laŭ Blazio Vaha)

### 2.2 “Relax” – libro de Wim Jansen

La docento por interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdam, Wim Jansen, ĵus publikigis eseecan libron, kiu estas interesa ankaŭ laŭ interlingvistika vidpunkto.

Jen, eltiraxjo el informo de la aŭtoro pri la libro:

“La verbo "relaxen" estas nederlandigita formo de la angla "relax" kaj anstataŭigas, jen kaj jen kaj laŭ la okazo, la aŭtoktonan "zich ontspannen".

Ĝi estas precipe populara inter gejunuloj kiel ekkrio "relax!" kun la signifo "Ne ekscitiĝu!", "Restu trankvila!" kaj simile.

Ĉi-kaze, temas pri citaĵo el la artikolo "Shit!" (p. 43), en kiu mi pafas miajn sagojn kontraŭ la plej fama nuntempa verkisto Harry Mulisch pro ties miskonduto rilate sian propran lingvon okaze de la ricevo de la plej granda literatura premio en nederlandlingvejo. La titolo estas ambigua, tiel lingve kiel sence: ĉu vere ni vidas fantomojn, timante pri la sorto de la malgrandaj lingvoj?

Ĉu indas trankviliĝi, prefere anglalingve?

La libro naskiĝis kiel rezulto de multjara kolektado de gazetaraj novaĵoj prilingvaj kaj prikulturaj en Nederlando kaj dum miaj multaj vojaĝoj.”

La ĉefaj temoj estas

- 1) kritikado de malzorgo pri la nederlanda, tiel el korpusa kiel el statusa vidpunktoj;
- 2) spicaĵoj el mia soveta periodo, kritikante la pompan arogantecon, per kiu la okcidenta teknika kaj scienca "elito" konkeris la kolapsantan regnon sen ajna kompreno de ties subsurfaca kulturo, sen ajna preteco ecx okupigxi pri ties lingvo aux ties atingoj malgraux la sistemo, sen ajna valorigo de la homa digno en situacio de disfalo de ies mondo;
- 3) la ridinda kaj ridiga anglemo, kiu infektis nian mondoparton;
- 4) la rolo de Esperanto kiel nemalhavebla pontlingvo en miaj leksikografiaj laboroj rilate la euxskan.

La eldonejon cxefe interesis la bunta miksaĵo kaj la de-ekstera vidpunkto de nederlandano, preskaux eksnederlandanigxinta pro sia internacia geedzeco kaj sia internacia laborkampo. Laux la peto de la eldonisto mi rilatigis cxiujn rakontojn, anekdotojn, ks. al triparta gvida motivo (I- la nederlanda hejme (en Nederlando), II- la nederlanda eksterhejme (en Euxropo) kaj III-lingva fikcio). La tria estas "prilingva scienca fikciaĵo" aux "prilingva fantasciencaĵo", en kiu mi priskribas, kiel novaj teknikaj evoluoj kondukos al la solvo de la lingvoproblemo. La teknika fono estas kredebla (por tiuj, kiuj iom konas la mondon de la mikroprocesoroj, de komputilaj tradukoj kaj de la mikrokirurgio), sed aliaj cirkonstancoj (kiel la homa fraŭdemo kaj multaj aliaj detaloj malkovrindaj) igas la atentan leganton dubi pri la tuto..."

### **3 Novaj libroj pri la Eŭropa Lingvo-politiko**

#### **3.1 Aktoj pri nederlanda simpozio: La lingva estonteco de Eŭropo**

La 17-an de decembro 2002 en la universitato de Amsterdam (Instituto por Ĝenerala Lingvoscienco) okazis simpozio kun la kadra temo "De talige toekomst van Europa – volgens een plan?" (La lingva estonteco de Eŭropo – ĉu ĝi sekvas planon?).

La aktoj de la simpozio aperis. Ili riceveblas ĉe: Faculteit der Geesteswetenschappen. Afdeling Taal- en Letterkunde. Leerstoelgroep Theoretische Taalwetenschap. Spuistraat 210. NL- 1012 VT Amsterdam, Nederlando.

Jansen, Wim (2003, Red.): De talige toekomst van Europa – volgens een plan?. Teksten van de lezingen gehouden tijdens het symposium op 17 december 2002. (Publikaties van het Instituut voor Algemene taalwetenschap 73) 62 p.

### **3.2 Robert Phillipson: English-Only Europe?**

Phillipson, Robert (2003): *English-Only Europe? Challenging Language Policy*. London – New York: Routledge, 240 S., ISBN 0-415-28807-X

### **3.3 Siegfried Piotrowski/ Helmar Frank: Europas Sprachlosigkeit**



### **3.4 Heinrich Kelz: Die sprachliche Zukunft Europas**

Kelz, Heinrich P. (2002, Red.): Die sprachliche Zukunft Europas. Mehrsprachigkeit und Sprachenpolitik. Baden-Baden: Nomos Verlagsgesellschaft, 283 p., ISBN 3-7890-7951-0.

#### **4 Forgesita (?) materialo: Kolokvaj aktoj el Slovakio**

Antaŭ 1989, do inter 1983 – 1986, Slovacia Esperanto Asocio okazigis kelkajn interesajn esperantologiajn kolokvojn kaj eldonis la ĉi-tamajn aktojn. Supozeble tiuj materialoj restis sufiĉe nekonataj, kvankam ili meritas atenton.

Pro tio ni reproduktas la enhavtabelojn.



**I:** Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko. I. Kolekto de prelegoj prezentitaj kadre de la lingva seminario 1982 en Nitra. Poprad: Slovakia Esperanto-asocio, 1983, 59 S.

**II:** Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko. II. Kolekto de prelegoj prezentitaj kadre de la lingvistika seminario en Nitra. 1983-11-25/27. Poprad: Slovakia Esperanto-Asocio, 1984, 79 S.

**III:** (Košecký, Stanislav, Red.): Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko. III. Kolekto de prelegoj prezentitaj kadre de la 5-a lingvistika seminario en Nitra, 1984-09-21/23. Poprad: Slovakia Esperanto-Asocio, 1985, 79 S.

**IV:** (Košecký, Stanislav, Red.): Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko. IV Kolekto de prelegoj prezentitaj kadre de la 6-a lingvistika seminario en Nitra, 1986-06-13/15. Poprad: Slovakia Esperanto-Asocio, 1986, 120 S.

## **Volumo I**

**Volume II**

**Volume III**

## **Volumo IV**

### **5 La biblioteko de Fajsi nun sekura**

La Budapeŝta Fremdlingva Biblioteko antaŭ nelonge aĉetis la bibliotekon de Karlo Fajsi (t.e. Fajsi Károly). La biblioteko krome havas Esperantan stokon sendependan de tiu kolektaĵo el jaroj pli fruaj. Eble iuj redaktaj kolektivoj estus pretaj, kompletigi iujn seriojn de la biblioteko.

Pro tio jen kelkaj indikoj pri la plej gravaj gazetoj havataj nekomplete. La posedataj jarkolektoj estas indikitaj.

Esperanto: 1955- 96 (do mankas la jarkolektoj, numeroj post 1996)  
Fonto: 1980 - 93  
Monato: 1980 - 97  
LPLP: 1981 - 1996  
Literatura Foiro: 1970 - 1998 .

Oni strebas igi la estraron de la biblioteko reaboni la suprajn revuojn porestante.

La adreso de la biblioteko estas: Országos Idegennyelvu Könyvtár Budapest V. ker., Molnár u. 11. Poŝta adreso: H-1462 Budapest, Pf. 469. Telefono: 118-2450 Faksnumero: 118-0147

Retadreso: [h9126oik@ella.hu](mailto:h9126oik@ella.hu)

(La prizorganto de la Esperanta materialo estas s-ro György Zsebeházy (.t.e. Georgo Ĵebehazi)

## 6 Interlingvistiko en Italio

La scienca komitato de Itala Interlingvistika Centro antaŭ nelonge diskutis la situacion de la interlingvistiko en Italio.

Sub la prezido de Romano Bolognesi, sekretario de IIC, partoprenis interalie Davide Astori, Federico Gobbo, Carlo Minnaja, Fabrizio Pennacchietti, Giorgio Silfer. Ĉi-lastaj skizis la evoluon de la studobjekto en Italio. Dum jardekoj pri ĝi interesiĝis praktike nur E-istoj. La unua doktoriĝa disertacio (pri la katolika E-movado) estis diskutita kun laŭdo en 1972 ĉe la Torina universitato (politikaj sciencoj). En la posta jardeko la disertacioj fariĝis kelkaj, naskiĝis IIC kun la eldona, publicista kaj konferenca aktivecoj, la ĉeesto en la universitatoj fariĝis pli sentebla. La ondo de la jubileo 1987 kaj, precipe, la falo de la Berlina Muro, kiu forigis la antaŭjuĝon en la okcidenta akademia mondo (pri Eo kiel objekto ligita al komunismo) kondukis al subita regajno de la malfruo de Italio en la interlingvistiko. Elstara, eĉ se science ne noviga, estis tiurilate la interesiĝo de Umberto Eco....

(Laŭ "Heroldo komunikas" n-ro 171)

---

**Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED)**  
ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.  
**Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.: ++ 49-30-54 12 633,**  
**fakso: ++ 49-30-54 56 742, [dblanke.gil@snafu.de](mailto:dblanke.gil@snafu.de). Mendojn oni direktu nur al UEA,**  
**kontribuojn nur al la redaktoro, per retroŝto aŭ sur diskedo. Artikoloj sen indiko**  
**pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi**  
**pruvekzempleron. Bibliografiatas nur viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.**  
**Pri CED vidu: [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org). Materialoj ĉiam bonvenaj. ISSN 1385-2191**

---